

# Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN - PROPAGANDA

Orgaan van de VLAAMSE ESPERANTISTENBOND, POSTBUS 100, MECHELEN

Postrekening 2321.50 van V. E. B. Raapstr. 74, Gent

Verschiĝnt maandelĝks  
Een en twintigste jaarg.  
Nummer 12 (244)  
DEC. 1954

Vertegenwoordiger in Nederland:  
L E E N  
sekr. Stadionkade 6, Amsterdam Z.  
postrek. 34563 van P. M. Mabesoone  
Pythagorasstr. 122, Amsterdam O.

LIDGELDEN:  
\* Leden: 100 fr.  
\* Steunleden: min. 150 fr.  
Inwonende leden: 25 fr.  
(\* met bondsorgaan

ABONNEMENTEN:  
Belgiĝ: 75 fr.  
Ceteraj landoj: 75 bfr.  
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

## LA MAJSTRO

Mi pensas pri Bialystok, antaŭ preskaŭ cent jaroj, pri alia naskiĝo en 1887...

Kaj pri la modesta, stature malgranda sed spirite giganta okulisto, kiu revis pri interkompreno de ĉiuj homoj kaj realigis konkordon, nu: inter la Esperantistoj... Ĉiam li oferis ĉion for, neis sin mem por la Ideo, por la evidenta solvo, por la Lingvo kaj la Idealo: Esperanto.

Jen mi ekspensas ankaŭ pri ni, la indaj idoj de tiu poletio, pri la Esperantistoj.

Nu, ĉu io ŝanĝiĝis? Vere ne, nenio!

Ĉu ni do estas malmolestaj, parolas aŭ skribas pri ni mem, kredas ke ekster nia persono ne eblas progreso por Esperanto? Kompreneble ne!

Ĉu ni do ne same oferas for nian tempon, niajn ambiciojn, eĉ nian monon kaj neas nian personon, forgesante eĉ la propran nomon? Kompreneble jes!

Ĉu ni do ne same aspiras al interkompreno inter ĉiuj homoj, ignorante la rasojn, la lingvojn, la politikajn kaj filozofiajn diferencojn aŭ nuancojn, kvazaŭ ni sentus strebadon al io alia ol la venko de Esperanto? Kompreneble jes!

Ĉu eblas aldoni ion pri la konkordo inter *samideanoj*? Ne, ĉiel ne: la poletio ne komprenus la demandon! Cetere, nun ne ekzistas io tia: eĉ ne la neakceptita statut-projekto, ĉar demokratiaj reguloj diktas la solvon!

Do, nenio ŝanĝiĝis, nenio. Kiel feliĉaj ni estas, tial!

Kaj mi ree pensas pri la Majstro, kiu estas nepre kontenta kaj kiu flustras: nu, ne hipokrite nomu min la Majstro, diru eĉ Luĉjo aŭ Zaĉjo sed agu kiel mi provis mem por nia sama celo, nia nedireble nobla celo!

15.XII.54.

d-ro T. Ken.

## LA REDAKTORO...

... *suferis, pro profesiaj devoj, neeviteblan prokraston, pro kio li petas vian indulgon kaj pardonon!*  
Venonta nro: ĉirkaŭ 10.1.1955!

## La 3-a Beneluksa Esperanto-Kongreso

Dum pentekosto 1955a okazos nia kongreso en Utrecht. En oktobro vi jam povis legi ke la L.K.K. komencis la laboron. Sed vi ne trovis la nomojn de la L.K.K.-anoj. Nu, jen ili estas:

G. H. Koudijs, prezidanto.

H. J. Blokker, vic-prezidanto por L.E.E.N.

D-ro Th. v. Gindertaelen, vic-prezidanto por F.I.L.E.

H. Sielens, vic-prezidanto por R.B.L.E.

F-ino A. J. M. Perk, sekretariino, Paulus Potterstraat 18, Utrecht.

F-ino C. Brouwer, Kasistino, postgirkonto 6403.23 je la nomo de Penningmeesteresse Tria Beneluksa Esperanto-Kongreso.

W. R. Koopmans, S-ino J. Keur-Meenhorst kaj J. Vanecek, anoj.

La membroj de F.I.L.E. kaj de R.B.L.E. mendu kaj pagu al siaj respektivoj kasistoj, kiuj estas: F-ino J. Terrijn, Raapstr 74, Gent (p.ĉ.k. VEB, Raapstr. 74, Gent, nro 232150); S-ino J. Plyson, rue Jourdan 185, Bruselo. p.ĉ.k. nro 37.66.98 de „Belga Kongreso de Esperanto”, Bruselo.

La kongresejo estos la hotelo Smits, Vredenburg 14. La 28-an de majo je tagmezo oni povos tie jam ricevi siajn dokumentojn. Posttagmeze la ĉefestraro de L.E.E.N. akceptos en la kongresejo pro la jubileo.

La oficiala malfermo, la vespera festo kaj la balo okazos en la „Gebouw voor Kunsten en Wetenschappen”, Mariaplaats 27. Pri la festo ni poste informos vin. Estas certe, ke ni aŭdos la kantaton de Frieso Molenaar, kaj Sinjorino Koopmans-Schotanus promesis kunlabori.

Kompreneble oni ankaŭ planas promenojn tra la urbo, vizitojn de muzeoj k.t.p. Iom pri la ekskurso.

Je la naŭa ni forveturos al la nacia parko „Hoge Veluwe”. Tie ni povos trinki kafon kaj manĝi bakajon. Poste ni povos promeni, La plej longa promeno, kiun ni intencas fari, daŭros unu kaj duonan horojn. Kiu ni ŝatas promeni ne bezonos cerbumi, ĉar la promenantoj revenos al la forir-loko! Tiam ni lunĉos kaj post tio ni reiros aŭtobuse al Utrecht. Je la kvara ni denove estos en la kongresejo pro la ferma kunsido.

## DORMANTAJ MEMORAĴOJ

Kiel en konkoj la perlaĵoj  
Sur la inetta mara fando.  
En monotona korprofundo  
Ripozas karaj memoraĵoj.

Se kaptdeziro lerte glitos,  
Perlaron ĉerpu el trankvilo,  
Sed lasu ĝin en ĉi azilo  
Se ploros vi kaj tro meditos.

Tra disreviĝoj ĉiuj havas  
Feliĉajn tagojn malpli nombrajn,  
Fergesu ja la horojn sombrajn,  
Admiru tiajn kiaj ravas.

Ornamoj estis de la vivo  
Ĉi tiuj enkaŝitaj gemoj.  
Do rida! Vivu plu sen ĝemoj:  
Vi eble estas ĉe la vivdeklivo...

Anna Meurrens

## SEMADO

Sur la maron pluveret'  
falis ĝate el ĉielo;  
tuj leviĝas marnivelo;  
ĝin ne sentas markviet'.

Frukto de studad' sen fin'  
homo ian veron semas;  
tamen, ke la mondo tremas,  
la homar' ne vidas ĝin.

Cirklaĵn kurbejn en la mar'  
strekas per la fal' pluvero;  
kaj ricevas per la vero  
novan vivon la homar'.

Vi burĝonu, pens', sen lac'.  
sen halt' en semad' kultura.  
Scias ni, ke pro gut' nura,  
plialtiĝos marsurfac'!

Amalia Nunez-Dubus

# LA STUDANTO

Jen la ĝusta formo de

*Ekzerco 20 A:*

1: Ĉu vi konas tiun sinjoron, kiu kuras tiom (ankaŭ: tiel, sed mi preferas „tiom”, ĉar temas ĉi tie ne pri maniero, sed pri grado de rapideco) rapide. 2: Kie vi vidas tiun (ankaŭ: iun) sinjoron kaj kien (direkta akuzativo) li kuras? 3: Li kuras en tiu direkto kaj surhavas tion ĉapelon, kian (ne: kiam; la relativo estu konforma al la antecedito) vi havas. 4: Kia estas lia ĉapelo, ĉu ankaŭ griza? 5: Jes, tiajn ĉapelojn oni vidas ofte kaj ĉie. 6: Kiam vi rimarkis tiun sinjoron, mi ne vidis lin, sed nun mi vidas lin tie (Ensendintino havis: „Iomete”). Ankaŭ tiu korelativo estas akceptebla ĉi tie). 7: Li ne plu kuras tiom (ankaŭ: tiel; vidu ĉe frazo 1-a) rapide kiom (ankaŭ: tiel; vidu la rimarkon ĉe frazo 3-a) antaŭ kelkaj minutoj. 8: Verŝajne li estas iom laca kaj ne plu povas kuri tiom rapide. 9: Kion li havas en la mano, ĉu pezan valizon? 10: Tiu (ankaŭ: Iu), kies mano devas porti tian pezan valizon, ne povas kuri (tiel), kiel li volas.

Jen la ĝustaj formoj de la verboj en

*Ekzerco 19 B:*

1: festis; ricevis. 2: Ricevinte (= Post kiam li estis ricevinta); sentis. 3: penis; povos (ne-rekta parolo; ankaŭ: povas; ne: povis); volos (volas; ne: volis; ankaŭ ne-rekta parolo). 4: avertis; vestu (La verbo „averti” esprimas ian konsilon, deziron aŭ ordonon kaj tial postulas la u-modon); frosti (post „por” sekvas infinitivo!). 5: Vestinte (la adverba participo anstataŭas adverban subpropozicion); trikitaj (adjektiva participo); intencis fari. Veturante; movante; ĝenate; ĝuis. 7: veturinte; terurita konstatis; haltas (ne-rekta parolo!). 8: klopodis refunkciigi; strikis; movigante (ne: movante). 9: ekŝvitis, preminte (ankaŭ: premente). 10: Montrigis; estas (ne-rekta parolo); malpleniĝinta.

**NOVAJ EKZERCOJ**

*Ekzerco 21 A:*

Tien, kie estas streketo, metu la literon *i* aŭ la literon *u*:

1: „Se mi sci—s, ke mi sukcesos, mi stud—s pl—,” diris Johano Malmokapulo. 2: „Far— pl— da ekzercoj kaj vi havos pl— da rezultato,” dir—s la patro. 3: „Stud— estas por mi tro malfacile,” asertis Johano pl—. 4: „Kion vi vol—s far— pl—?” demand—s la patro. 5: „Mi ŝat—s help— la laktvendiston,” risk—s Johano propon—. 6: „Ĉ— vi tiam hav—s pl— da ŝanco en la vivo?” 7: J.: „Mi pl— ŝatas vend— ol viziti pl— la lernejon.” 8: La patro ne pl— esper—s konvink— la knabon kaj ne vol—s

turment— lin pl—. 9: J. pl— fervore helpis la laktvendiston ol li antaŭe stud—s. 10: Komence li ĉiutage vendis pl— kaj pl—, sed poste ne pl— pov—s vend— pl—.

*Ekzerco 20 B:*

Metu la interkrampajn verbojn en la ĝustan pasivan formon (ekz. estis farata):

1: Ĉiutage je la naŭa la bebo (bani) de la patrino. 2: Kelkajn minutojn antaŭ la naŭa, kiam la bebo (bani), venas la najbarino, kiu ĉiam (kortuŝi) de la banado. 3: Tuj kiam la infano (bani), la najbarino iras hejmen. 4: Ĥieraŭ la najbarino venis jam kvaronon antaŭ la 9-a, kiam la bebo (bani) kaj tial (preni) el sia lulilo. 5: La najbarino foriris, kiam la bebo (bani) kaj (rekuŝigi) en sian lulilon. 6: Morgaŭ kelkajn minutojn antaŭ la 9-a la najbarino certe revenos, ĉar tiam la bebo (bani) kaj do (preni) el la lulilo. 7: Ankaŭ morgaŭ la najbarino

(kortuŝi), kiam la bebo (bani). 8: La najbarino forlasos la ĉambron, kiam la bebo (bani). 9: Student(in)o, kies ekzerco (fari) sen eraroj, (viziti) de Sankta Nikolao. 10: Student(in)o, en kies ekzerco eĉ nur unu eraro (trovi) de mi, (puni) de Nigra Petro.

Ekzercojn korektotajn gelegantoj sendu al la kompilinto de la rubriko: S. S. de JONG Dzn, Waltaweg 3, Tjerkwerd bij Bolsward (Frislando), Nederlando.

## Esperanto in de school

In het Octobernummer deelden we reeds mede dat op de Rijksskweekschool te Arnhem een Esperanto-cursus gegeven wordt. Thans bereikte ons het bericht dat mede door het werk van het Arnhems Contact-Comité ook een cursus wordt gegeven aan de Centrale V.G.L.O.-school aldaar, die geleid wordt door Mej. E. Leopold en waaraan een 30-tal leerlingen deelnemen.

Wij wensen allen die tot de oprichting van deze cursussen hebben medegewerkt van harte succes.

## MEDEDELINGEN VOOR DE BOEKENDIENSTEN

### DECEMBRO - LIBROMONATO

		gld.	fr.
La internacia lingvo (D-ro Lapenna)	bind.	5,75	76,—
Peer Gynt (Ibsen)	broŝ.	8,—	90,—
id.	id.		
La Normandaj Rakontoj (Maupassant)	bind.	12,—	160,—
La Nevenkebla ĝeno (Thyssen)	„	4,90	70,—
Fabiola (Wiseman)	„	8,—	80,—
id.	broŝ.	4,50	
Ferio kun la morto (Lindqvist)	„	2,25	30,—
La Knaboj de la Paŭlo strato (Molnar)	„	1,20	16,—
Colomba (Merimee)	„	1,20	16,—
Herman kaj Doroteo (Goethe)	„	0,75	10,—
El la „Camera Obscura” (Hildebrand)	„	0,75	10,—
Ĉe la Sanktaj Akvoj (Heer) Svisa romano	bind.	6,75	75,—
La Alia Pasinteco (Bulthuis)	„	4,90	70,—
Judoj sen mono (Gold)	„	2,90	
La Vojoj estas nekonataj (Kassak)	„	2,90	40,—
La Vivo de Nia Sinjoro Jesuo (Dickens)	„	3,70	60,—
Vivo de Zamenhof (Privat)	„	3,25	40,—
Undino (Schreiner)	„	4,25	40,—
Romano pri Afrika bieno (Schreiner)	broŝ.	1,50	26,—
Victoria (Hamsun)	„	1,40	22,—
Tajo kaj Ĉerik (por junuloj)	„	0,90	
La Hundo Kruso (Ballantyne)	„	1,75	
La Homaj Rasoj (Nordenstreng) ilustrita	„	3,40	40,—

Por viaj korespondantoj:

Haarlem (kun multaj fotoj)	broŝ.	1,—	
Rakontoj pri Nederlando (Duhamel)	„	1,75	25,—
Salutkartoj por Kristnasko kaj Novjaro du serioj de 10 diversaj kartoj, resp. 0,85 kaj 1,10			—
Belegaj kartoj (formato 9 x 12) kun angulornamajo (verda stelo kaj 2 sonoriloj) kaj kun la vortoj „Gojan Kristnaskon kaj Feliĉan Novan Jaron” verdkolora preso karto kaj koverto kune		—	1,50

## MENU ĈE

Libro Servo LEEN, Pythagorasstraat 122, Amsterdam  
Flandra Esperanto Instituto, Blankenbergse steenweg 72, BRUGGE

## Por pli vasta utiligebleco de Esperanto

En la „Neue Züricher Zeitung“ aperis en No. 2585, la 20an de oktobro 1954, artikolo sub la titolo „Für eine Welthilfssprache, Koordinierte Esperantokurse in Zürich“. Ĝi estis signita T.P.-R. do ĝi estas verkita de d-rino Tina Peter-Ruetschi. Ĝi unue raportas pri la stato de la koordinitaj Esperanto-kursoj en ĉi tiu jaro, por kiu anoncis sin jenaj lokoj, Brussel, Kopenhagen, Herten in Westfalen, Hildesheim, Manchester, Helsinki, Mikkel, Ootkumpu, Bordeaux, Paris, Den Haag, Haariem, Utrecht, Salzburg, Wien, Lund, Karlskrona, Nybro, Koskukkskulla (Laponio), Bern kaj Zürich. Poste la artikolo daŭrigas kun kelkaj proponoj, kiuj por la Esperantistaro ĝenerale povas esti interesaj kaj kiujn ni tial ĉi tie tradukas.

„La ĝisnunaj eblecoj utiligi Esperanton dependas ĝenerale de la starigo de personaj ligoj kun aliaj esperantistoj kaj de la ekzisto de Esperantogrupoj. Evidente ekzistas bezono utiligi la lernitan Esperantolingvo ankaŭ aliloke, simile kiel ĉiun nacian lingvon. Pro tio oni devus klopodi plivastigi la eblecojn utiligi Esperanton en tia maniero, ke rondoj kiuj ĝis nun ne interesiĝis pri ĝi, ekkonsideru ĝin lerninda. Kia fako ekzistus, kiu pli bone adaptiĝus al tiu neceso ol la turismo.

Oni do devus enkonduki unue Esperanton en certaj instalaĵoj de la urboj, kiuj estas gravaj por la turismo, kaj sufiĉus por la komenco, se unu oficisto de la koncerna entrepreno majstrus la lingvon. Por la komenco de tiu agado estas konsiderendaj la informoficejo en la ĉefstacidomoj, eventuale de la flughaveno, la gazetkiosko en la ĉefstacidomoj, centra vojaĝoficejo, junulargastejo, unu aŭ du rekomendindaj hoteloj de la meza kategorio, restaŭracio, senalkohola restaŭracio, restaŭracio en aparte bela situo, kafejo, konditorejo, fotovendejo, ĉokoladvendejo, eble pliaj fakaj vendejoj. Por ke ĉiu vojaĝanto povu serĉi la kunlaborantajn entreprenojn sen tempo-perdo, li provizore povu trovi ilin en la telefonkatalogo de la koncerna urbo sub la vorto ESPERANTO. Liston de la kunlaborantaj urboj de ĉi lando oni povus disponigi al la vojaĝantoj en la gazetaraj kioskoj en la ĉefstacidomoj. La starigo de tia reto ne tre densa de Esperantoparolejoj povus nur esti komencata, kiam en la koncernaj ŝtatoj jam ekzistaj unuopaj fortocentroj. Oni do devus unue krei tiajn Esperantoparolejojn en ĉiuj landoj, kie okazis koordinitaj Esperantokursoj, antaŭ ĉio en la ĉefurboj kaj turismaj centroj.

Se ĉiuj interesitaj rondaj intencas kunlaborus, oni povus pensi pri efektivo de tiu propono en malgranda kadro dum unu jaro. Tre utile estus krome, se la enlandaj Esperantistoj

mem konsiderus la Esperantoparolejojn por siaj personaj bezonoj. La sistemo kompreneble povas esti plivastigita pli kaj pli kun la fina celo, ke persono vojaĝante eksterlanden nur bezonus scii unu fremdan lingvon, nome Esperanton.

La pli granda utiligebleco de Esperanto, flanke de ĝia facile lernebleco, instigos multajn personojn okupiĝi pri ĝi. Inter ili estos multaj, kiuj verŝajne sub aliaj cirkonstancoj tute ne lernus fremdan lingvon. Aliflanke nun multaj personoj ankaŭ pro profesia utilo interesiĝos pri ĝi. Per tio Esperanto alproksimiĝos al la plenumo de sia celo, servi kiel ponto inter la diverslingvaj popoloj sen forpuŝi la naciajn lingvojn.”

### El la pasinta mondlingva movado

La nuntempa samideanaro eble ne scias, aŭ ne plu memoras, ke iam ekzistis privataj klopodoj, pliigi la jam estantan vicon da Internaciaj Oficejoj per t.n. *Mondlingvo-Oficejo*. Cefinicianto estis la konata Prof. Wilhelm Ostwald el Leipzig, kiu en septembro 1910 per prelegoj sugestis la fondon de tia oficejo kun la taskaro klare fiksi la evolufazojn kaj la tiaman staton de la mondlingva movado kaj garantii al tiu ideo konstantan akcelon. Prof. Ostwald kun kelkaj helpantoj sukcesis anigi al sia plano aron da privatuloj kaj societoj. La 27an de februaro 1911 estis fondata en la svisa ĉefurbo Bern la „Unuiĝo por kreonta Mondlingvo-Oficejo“. La fondintoj elektis Kolonelon Emil Frey, la eks-prezidanton de la Federacia Konsilistaro kiel honoran prezidanton, D-ron Albert Gobat, la Nacian Konsilanton kaj Registaran Konsiliston de la kanton Bern kaj pliajn 25 membrojn por la estraro. La laŭstatuta celo de la Unuiĝo estis preparadi kaj instigadi diplomatan agon koncerne la fondaĵojn unue de Interŝtata Mondlingva Societo kaj finfine de la Mondlingvo-Oficejo. Ĉi-lasta estus zorgonta laŭ „strikte neŭtrala maniero“ pri la enkonduko de oficiale rekonota mondlingvo. En la unua, presita jarraporto 1911 (supoze ne sekvis pliaj) la Unuiĝo nombris 104 membrojn el 11 diversaj ŝtatoj. Oni intencis fervore propagandi internacie kaj esperis, helpe de la Svisa Federacia Konsilistaro, antaŭenigi la aferon. Koninte la agantojn, la esperantistaro dekomence detenis sin de tiu de Idistoj provita, tendence vualita entrepreno. La ne-neŭtralaj gvidantoj sin mem manovris en dilemon kaj tre baldaŭ la kreaĵo fiaskis kaj plene disfalis. Ĉis vera karaktero plej draste estas pruvita pro la fakto, ke la iniciantoj de la menciita Unuiĝo en

la jaro 1913 perletere proponis al la Svisa Federacia Konsilistaro, al la Registaro de la kanton de Bern kaj al la Konsilistaro de la urbo Bern neniel subvencii la Naŭan Universalan Kongreson de Esperanto en Bern.

D-ro A.B-n/FST

### Al la 15a de decembro

Naskiĝtago de Zamenhof

Denove rememoras ni

la tagon, kiu lumon al ni naskis fendante hele la ĝangal-krepuskon.

El eta pola urbo ĉi radi'

mision gloran al ni ĉiaj taskis:

plue transplanti ĝin en ĉies bruston.

Simpla, modesta homa fil'

kaj diligenta paca batalinto,

hodiaŭ via nobla verko kaj strebado'

por multaj jam fariĝis kara, sankta il'

en la babela monda labirinto,

sorĉ' kiu hmon igas homa frat'.

Scias ni, ke ĝi estas sorĉ',

kvankam ĝi ŝajnas nun Kolumba ovo!

Vi, Majstro, ĉi miraklon al ni donis.

Ne gravas, ke ankoraŭ tiu torĉ'

videblas ne por ĉies vidopovo,

ke iuj ĉe ne vidi ĝin ordonis.

Korŝcias longe ĉiu jam,

ke sole lingva diversec' ne baras

hmaron sur la voj' al paco kaj felic',

ke la kondiĉ' de harmonio estas am',

ĉe kies flankoj just' kaj klero staras,

ke knuton anstataŭu honestiĝ'.

Vi, kara Majstro, sciis ĝin,

kvankam en temp' alia, vi tre klare

fiden al venko de prudent' esprimas.

Denove ŝtormas. Sed ni sekvas vin

kaj meti niajn korojn malavare

sur la altaron vian ni ne timas.

Jiri Korinek

### Lastmomentaj depeŝoj!

El *Montevideo* oni ĵus eksciis ke la Plenumkomitato de UNESKO decidis, per ĉiuj voĉoj kontraŭ du, rekomendi al la Generala Konferenco la akcepton de UEA kun konsulta pozicio. (Laŭ ĵus ricevita informo de d-ro Lapenna, nia Observanto ĉe la Konferenco).

\*\*

El Londono ni ekaŭdis la nekonfirmitan novaĵon ke la projekto de nova UEA-statuto ne estas akceptita, ĉar la por-voĉoj ne atingis la 3/4 de la esprimitaj voĉoj. Ni ankaŭ povas anonci ke i.a. voĉdonis „por“ la nederlanda asocio LEEN kaj „kontraŭ“ la belga, flandra kaj svisa asocioj.

**NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA”**

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst:  
 Mr A. J. Kalma, Stadionkade 6, Amsterdam-Zuid, tel. 96160.  
 Penningm.: P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O, postrek. 34563.  
 Boekendienst: S. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postrek. 76915,  
 Schr. cursus voor gevorderden: H. Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom.  
 Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.  
 Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuylplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.  
 Alg. Ned. Esp. Examen-comm. Mej H. M. Mulder, Zilvermewuustr. 29 Badhoevedorp  
 Cefdel. U.E.A.: J. Telling, Schietbaanlaan 106, Rotterdam. Postrek. 242619.  
 Vic-ĉefd. F. Weeke, Zwolseweg 172 A, Diepenveen. Postrek. 22075.

**KOMUNIKOJ  
DE LA ĈEFESTRARO**

Proponojn, pritraktotajn en la jar-kunveno de nia jubilea kongreso je Pentekosto 1955 en Utrecht, oni sendu antaŭ la 15-a de jan. 1955 al la ĝen. sekretario.

La ĉefestraro proponas ne plialtigi la kotizojn por la venonta jaro. Ili do laŭ tiu propono restos jenaj:

Sekciaj membroj g. 3,75  
 Generalaj membroj g. 4,25  
 Samhejmanoj g. 1,75  
 Gejunuloj g. 1,75  
 Senlaboruloj g. 2,25

Konigis la deziron ekŝigi kiel ĉefestraranino f-ino A. Hellinx el Hilversum. Krome laŭregulare ekŝigos s-ro F. Weeke, kiu estas reelektebla. La sekcioj povas proponi kandidatojn antaŭ la 15-a de januaro.

Provizore s-ro B. J. J. Albers el Amsterdam pretas transpreni la taskon de s-ro P. M. Mabesoone ĝis la jar-kunveno. Por tiuj, kiuj laboris por la kongreso en Haarlem, s-ro Albers ne estas nekonato. Kiel revizoro li faris multan utilan „postkulisian” laboron antaŭ kaj post la kongreso. La adm. ĉefestraro kaj sekcio Haarlem tre ĝojas ke s-ro Albers pretas akcepti kandidatecon kaj volonte kandidatigas lin kiel novan ĝen. kasiston.

**Kandidatigo**

La harlema sekcio „Komprenado faras Pacon”, kandidatigas S-ron B. Albers, Amsterdamo, por la funkcio de ĝenerala kasisto de L.E.E.N. S-ro Albers kontrolis la librotendadon de la 39-a kongreso de U.E.A. kaj faris tiurilate meritplenan laboron.

**La interseka tradukkonkurso**

La partopreno en nia tradukkonkurso vere superas niajn atendojn, ĉar 16 sekcioj kun entute 144 membroj volas montri sian kapablon en la tradukarto. Ni petas ĉiun sekcion ensendi la faritan taskon nepre antaŭ la 15-a de Decembro, por ke ni en la Februara numero povu menci la rezulton. La gvidanto.

**Alvoko**

La Estraro de la Universitato Esperantista Rondo Amsterdama petas la gepatrojn de studentoj en la Universitato de Amsterdam sciigi la nomojn kaj adresojn de siaj gefiloj al la sekretario de la UERA, por ke li povu informi ilin pri la agado de la UERA kaj la eblecoj de Esperanto-studado en la Universitato.

La sekretario de la UERA, R. Vetter, Corn. Trooststraat 25, Amsterdam-Z.

**EXAMEN-UITSLAGEN**

Utrecht, 30 Oct. 1954.

Aangemeld voor examen M 6 candidaten, opgekomen 6, geslaagd 5: de dames R. L. Linschoten te Bilthoven, C. de Jonge te Groningen, L. Alings te Leiden en de heren J. H. Morreau te Hilversum en J. C. Th. Kwak te Vlaardingen.

Aangemeld voor examen E 26 candidaten, opgekomen 26, geslaagd 15: de dames E. A. P. M. Ariëns, A. H. Bruins, E. B. Ketelaar, Th. M. A. Snelder en C. A. W. Witteveen te Arnhem, J. C. v. Tinteren te Baarn, E. M. J. Graeve te Bussum, J. M. v. Roode te Haarlem, J. J. M. v. d. Bos te Heemstede, W. Visser te Leiden, A. Deen-Meilink en G. Ch. Putman te Naarden, A. W. Geytenbeek te Zeist en de heren C. J. en J. G. v. Lookeren-Campagne te Bilthoven.

Onze gelukwensen aan de geslaagden en in het bijzonder aan onze leden!

**Onze examens**

Met het op 30 October te Utrecht gehouden examen zijn onze examens voor dit jaar weer afgelopen. We weten de totaal uitslag nog niet, maar naar wij er van gezien hebben geloven we niet dat de uitslag erg gunstig zal zijn. Er wordt wel gezegd dat onze examens te moeilijk zijn, vooral voor de E-candidaten. Wij kunnen dit echter niet onderschrijven en om U een indruk te geven hoe sommige candidaten eenvoudige zinnen menen te moeten vertalen geven we hieronder enige voorbeelden.

In de zin: Nauwelijks waren we thuis of het begon te stortregenen werd „nauwelijks” vertaald met almenaŭ; tamen. „Of” met aŭ, ĉu ke. Het laatste gedeelte door „komencis pluvegante.”

De zin: Verleden week vertrokken mijn oom en tante naar Amerika om daar hun oudste zoon te bezoeken, werd vertaald met: „Malantaŭan semajnon mia onklo kaj onklino partis al Ameriko por viziti ilian plej maljunan filo tie”.

95 is volgens sommige kandidaten kvin naŭdek.

Zij stond op het punt om naar bed te gaan is „Ŝi estis kuŝonta, ŝi estis elironta; ŝi jus enliritus.

„toen plotseling het electrisch licht uitging,” werd vertaald met kiam a-brubte la elektita lumo elstingis, eliris, foriris, malaperis.

„Mijn vader heeft een huis laten bouwen” is Mia patro lasis konstruita domon; estis konstruita por mia patro domo.

„de heer P.” is la sinjoro P.

„aan U toe te zenden” is sendi al vin „bron” is bronno.

„er kwam een oude vrouw op haar toe” is venis maljuna viro ĝis ŝi.

„Gezond maar arm kwam hij terug” is sane sed malriĉe li revenis.

„een zacht gekookt ei” is maldura kuirinta ego; bolita ovo, bruligita ovo.

„Ga vlug naar het postkantoor” is iru rapide al la poŝtoficejon.

postzegel = stampo; geschenk = prezento, donato, donajo.

eerlijk = honora, honete.

„Hoe laat is het” is Kiom da horo estas? Kia horo estas?

„t Is kwart over drie” is estas la tria kaj kvarto.

Ziehier waarde lezers een kleine bloemlezing uit gemaakte fouten. Naar onze mening blijkt hieruit duidelijk dat de candidaten met onvoldoende kennis van de taal naar het examen toegaan.

En dit is niet de schuld van de candidaten maar van de opleiders, die te lichtvaardig hun candidaten aan een examen laten deelnemen.

Men moet nu eenmaal voor elk examen op welk terrein ook aan bepaalde eisen kunnen voldoen en daarom is het noodzakelijk dat de opleiders goed op de hoogte zijn van deze eisen en gaat het naar onze mening niet aan om wanneer het aantal niet-geslaagden te groot is maar te zeggen dat het examen te moeilijk is. Dat is het paard achter de wagen spannen. Zeker we geven direct toe, dat het voor de candidaten niet prettig is als ze niet slagen, maar dat mag toch geen reden zijn om de eisen zo laag te stellen, dat daarmee de waarde van het diploma verloren gaat. Op die manier zou men het kweken van „eternaj komencantoj” juist in de hand werken en dat kan toch de bedoeling

niet zijn. Ook voor het E-diploma geldt, dat de bezitter ervan enige kennis van de taal heeft en dan moet die „enige kennis” grondig zijn en behoorlijk functioneren. F.W.

### Kalendaro de „Pro Juventute”

Aperis la kalendaro por 1955 de la Asocio „Pro Juventute”, la asocio, kiu okupas sin pri la ŝirmado kaj helpado de infanoj, kiuj vivas en malfacilaj kaj malbonaj cirkonstancoj. La kalendaro estas dediĉita al niaj princinoj Beatrix, Irene, Margriet kaj Marijke pro kio ŝia reĝina Moŝto Juliana kaj Lia Princa Moŝto Bernard afable disponigis specialajn fotojn fari-tajn de Lia Princa Moŝto mem kaj de kelkaj amikoj Liaj. La fotoj vere estas plej ĉarmaj kaj ni estas konvinkitaj ke multaj volas posedi ĉi tiun belan kalendaron ne nur pro tio, ke ĝi estas ornamo por la familia ĉambro sed ankaŭ pro tio ke per la aĉeto de ĉi tiu kalendaro oni grave helpas Pro Juventute en ĝia laboro por kom-patindaj infanoj.

Ĝi estas havebla ĉe ĉiuj asocioj kaj sekcioj „Pro Juventute” aŭ se oni pagas 2,75 gld en la ĝirokonto No 51.7400 nome de Kalenderactie „Pro Juventute”, Van Lenneplaan 46, Soest Zuid.

### 40-a Universala Kongreso de Esperanto en Bolonjo (Italujo) 30 julio - 6 aŭgusto 1955

Nia asocio estas la peranto en Nederlando por nomita kongreso. Ĉiuj pagoj estu direktataj al la kasisto de L.E.E.N. (poŝtkonto n-ro 34563), kie ankaŭ estas havebla la unua oficiala bulteno kun aliĝilo.

Jen la kongreskotizoj:

ĝis 31-XII-1954; ĝis 31-III-1955; poste Kongresano

g. 21,50 g. 24,70 g. 29,50  
Edzino de kongresano

g. 10,75 g. 12,35 g. 14,75  
Junul(in)o ne pli ol 20-j.

g. 7,20 g. 8,20 g. 9,80

Studentoj  
g. 10,75 g. 12,35 g. 14,75

Plenaĝaj aliĝontoj, kiuj estas Individuaj Membroj de UEA (t.e. ricevas la jarlibron) rajtas rabaton de g. 4,20. Edzino de membro rajtas de duono de tiu sumo, do g. 2,10. La rabato ne validas por gejunuloj kaj studentoj.

La kongreskostoj en nederlanda monno entenas la kostojn pri transpago al Italujo.

Ni esperas ke multaj LEEN-geanoj intencas partopreni ĉi-tiun gravan jubilean kongreson. Se sufiĉe multaj personoj baldaŭ informos nin, ni projektos eventualan specialan LEEN-karavanon kun aŭtobuso.

Tiuj, kiuj partoprenis en la baza kapitalo de la Univ. Kongreso en Haarlem, bonvole relegu nian koncernan anoncon en la oktobra numero. Post la fino de la jaro, ni ne plu repagas.

# Flandra Ligo Esperantista.

Postbus 100, Mechelen

Prezidanto: Gerard Debrouwere, Magdalenastraat 29, Kortrijk.

Sekretario: Maertens G., Pr. Leopoldstr. 51, St.-Kruis, tel. 33445 (dum la ofichoroj).

Kasistino: F-ino J. Terrijn, Raapstraat 74, Gent.

Biblioteko: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht (Nederland)

U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.

Redakcio F.E.: Dr. T. van Gindertaelen, Raghenoplaats 9, Mechelen (tel. 136.77)

Koresponda kurso: A. Nysstraat 37. Anderlecht

### 1955 V.E.B. - Jubeljaar

*Proficiat!..... We beginnen deze kroniek tegen onze gewoonte in met een terugblik op hetgeen verleden maand werd aangekondigd; we deden het origineel voorstel enkele buitenlandse abonnementen op Esperanto-tijdschriften ter beschikking te stellen van de eerste vijftien leden die een aanvraag hiervoor aan de sekretaris zouden richten. Er werd hierbij aangestipt dat alle snelle verbindingsmiddelen mochten gebruikt worden, omdat het onherroepelijk de eerste vijftien, en niet meer, zouden zijn die van dit voorstel zouden genieten; het resultaat is verbluffend en tevens verheugend geweest. De reactie van onze leden was uitermate snel: al de aanvragen zijn binnengekomen op 31.10, 1 en 2.11.1954.*

*Het jubeljaar-geschenk van deze maand is tweezijdig. We hebben eerst en vooral een verrassingspakket voor al de leden (met uitzondering van de inwonende) dat zal toegezonden worden aan elk lid 1954 in de loop der maanden December en Januari, en bevattende Esperanto-tijdschriften, folders, boekjes, propagandamateriaal en dergelijke. Diegenen die op het sekretariaat zijn ingeschreven als sekretaris ener afdeling, zullen als supplement een kongresboek 1954 van het U.K. te Haarlem ontvangen.*

*Het kan natuurlijk niet allemaal van dezelfde kant komen is 't niet? Mogen wij dan ook aan elk lid iets vragen? Och ja, U zijt allemaal reeds zeer actief geweest, in onze Esperantobeweging, hetzij plaatselijk, hetzij in de schoot van de Bond, hetzij op internationaal gebied. Maar laten wij nu eens, ter gelegenheid van ons Jubeljaar, van deze voltooid verleden tijd een onvoltooid tegenwoordige maken, door één nieuwe daad, door één nieuwe actie, door één fris gedacht! Kom, schud jezelf eens wakker, en geef een stoot mee, het is voor ons jubeljaar. En we hebben allen reeds zoveel tijd en geld in Esperanto belegd, dat wij niets riskeren met er nog een beetje bij te doen, want dat beetje zal wellicht al het andere doen renderen. En wat zou het zijn moest nu eens elk lid, (ach nee, het kan niet)*

*maar dan ook elk lid iets doen, nog één keer, wat een sprong voor onze bond en voor Esperanto in het Vlaamse land, wat een reuzesprong! Wat het moet zijn? Initiatief nemen door plaatselijke propaganda, aanwerving van nieuwe en van vroegere leden — nieuwe leden zelfs niet-Esperantisten, al was het maar voor dit ene jaar — abonnementen op „De Esperantist”, een bestelling van boeken bij het instituut, geldelijke steun, materiele steun, een voorstel aan het Bestuur gericht, en ja, zelfs een artikel in ons blad is welkom, maar doet iets, nu nog, in de maand December, en vergeet niet het te melden aan de sekretaris. Het zou een actie moeten zijn, als een gebalde lading, zó plots en zó hevig!*

*Ook het sekretariaat heeft iets dergelijks in petto. Maar, wij verklappen niets....! En .... hebt U reeds uw steentje voor ons jubeljaar aangebracht door storting van 150 F of meer, als steunend lid? Dank U.*

### STATUTA ĜENERALO LIGKUNSIDO GENT 1912.53

*La flandraj Esperantistoj kaj pre-cipe la ligaj kaj sekciaj estraranoj kaj la reprezentantoj estas petataj ĉeesti la sube indikitajn kunsidojn. Ne forgesu art. 9 de la organiza regularo. La estrarkunveno kaj la ĝenerala kun-veno okazos en „Café de Gand”, Graaf van Vlaanderenplein (Zuidpark — tra-mo 7).*

#### ESTRARKUNVENO (13-a horo)

1. Malfermo - 2. Financa raporto - 3. UEA raporto - 4. kunlaboro kun aliaj landoj asocioj - 5. Eksiĝoj de estraranoj (art. 21 O.R.) - 6. Jubileo - proponoj - 7. Diversaj - 8. Fermo.

#### Jarkunveno (15-a horo).

1. Malfermo
2. Financa raporto
3. Sekretaria raporto
4. UEA raporto
5. Raporto pri la koresponda kurso
6. Kunlaboro kun aliaj landaj asocioj
7. Bilanco 1954 kongreso Lieĝo
8. Eksiĝo de 6 estraranoj kaj elekto
9. Varbado - kotizoj
10. Diversaj proponoj (Jubileo)
11. Fermo

# LA GIMNAZIO

de : *Salom Alejhem*

el la hebrea : *d-ro L. L. Zamenhof*

(Fino)

„Nu”, mi diris al mi, „tio estas ja fine la ĝusta afero!” kaj mi klarigas al li, ke mia nomo estas Katz Arono katz, kaj mia filo estas nomata Moseo t. e. Mosko, kaj mi volas, ke li eniru en la trian klason. Tiam li diras al mi, ke se mi estas nomata Katz kaj mia filo estas nomata Moseo, t. e. Moŝko, kaj li volas eniri en la trian klason, mi alkonduku lin, li diras, en Januaro, kaj li tiam certe estos akceptita. Vi komprenas? jam tute aliaj paroloj! Videble, se oni ŝmiras, oni veturas... Estas nur bedaŭrinde, ke ne tuj; sed kion fari? se oni ordonas atendi, oni devas atendi, hebrea ja al kutimiĝis...

Venis Januaro, denove tumulto, kurado tien kaj reen: hodiaŭ, morgaŭ devas esti kunsido, ili ĝin nomas „sovjet”; kunvenos la direktoro kun ĉiuj instruistoj de la gimnazio, kaj nur post la kunsido, t. e. post la „sovjet”, kiel ili ĝin nomas, oni scios, ĉu la knabo estas akceptita aŭ ne. Venis la ĝusta laboro; mia kunulino ne estas plu hejme; ne ekzistas tagmanĝo, ne ekzistas samovaro, nenio ekzistas: ŝi estas en la gimnazio; aŭ pli vere, ne en la gimnazio, sed apud la gimnazio; ŝi vagadas ekstere en la frosto de la plej frua mateno, kaj ŝi atendas, ĝis oni disiros de la kunsido, t. e. de la „sovjet”, kiel ili diras... La frosto tranĉas, neĝvento blovas, malbonega vetero, kaj ŝi vagadas ekstere apud la gimnazio kaj atendas; virino ĉiam restas virino! Ŝi scias je tre bone, ke se oni promesas, oni sankte plenumas, tiom pli ke... vi komprenas? sed iru, parolu kun virino! Unuvorte, ŝi atendas unu horon, ŝi atendas du horojn, ŝi atendas tri horojn; ŝi atendas kvar horojn; ĉiuj infanoj jam delonge disiris el la gimnazio hejmen, kaj ŝi ĉiam ankoraŭ atendas. Tamen kion vi volas? ŝi atendis tiel longe, ĝis ŝi fine atend-atingis sian celon: la pordo malfermiĝas, kaj el tie eliras unu el la instruistoj; ŝi tuj alsaltas al la instruisto kaj kaptas lin kaj demandas, ĉu li ne scias, per kiaj decidoj finiĝis la kunsido, t. e. la „sovjet”, kiel ili diras. Kaj li respondas: „kial do mi ne scias? oni akceptis”, li diras, „entute dudek kvin infanojn, dudek tri kristanajn kaj du hebreajn”. „Kiu?” ŝi demandas. — „Unu nomatan Ŝapselson kaj unu nomatan Katz”. Apenaŭ ŝi aŭdis la nomon Katz, mia virino simile al sago el pafarko flugas hejmen kaj enkuras en la domon kun ĝojego: „Mi gratulas! Mi dankas vin, ho, granda Dio, mi dankas! Akceptita! akceptita! Kaj dum ĉiuj okuloj estas plenaj de larmoj... Al mi, kompreneble, la afero ankaŭ certe estas agrabla, sed danci pro tio mi ne havas ja la devon,

mi estas ja viro, ne virino... „Mi vidas”, ŝi diras al mi, „ke por vi tio ne havas tre grandan valoron?” — „Kia kaŭzo”, mi diras, „vi faras al vi tian komenton?” — „Tiakaŭze, ke vi estas malvarma peco da viando; se vi scias”, ŝi diras, „kiel la kompatinda infano tremas de emocio, vi ne sidus tiamaniere, vi jam de longe kurus mendi por li uniformeton kaj ĉapeton kaj vi rapidus”, ŝi diras, „fari festenon por la amikoj.” — „Kial subite fari festenon?” mi diras; „ĉu ĝi estas bar-micvo 14) aŭ fianĉigo?” Tiele mi diras al ŝi tute trankvile, ĉar mi estas ja viro... Tiam ŝi ofendiĝas kaj tute ĉesas paroli kun mi; kaj se edzino ĉesas paroli, tio estas ja miloble pli malbona ol insultado, ĉar, se ŝi insultas, oni almenaŭ aŭdas homan voĉon, kaj nun... parolu al la muro!... Unuvorte, por kio mi devas multe paroli? venkis kompreneble ŝi, ne mi; ĉar se „ŝi” ion volas, ĉu oni povas tiam ion kontraŭfari?

Unuvorte, oni faris festenon. Oni kunvokis parencojn kaj amikojn, kaj la knabon oni vestis de la kapo ĝis la piedoj: tre bela uniformo kun blankaj butonoj, ĉapo kun ornamajeto 15) antaŭe, — plena guberniestro! Kion oni agis koncerne lin, tio efektive estis plene meritita, oni enmetis en lin kvaŭzaŭ novan animon, oni simple lin revivigis; li brilis, mi diras al vi, kiel la suno en Julio. La gastoj trinkis pro sano, oni gratulis, oni bondeziris: „Li iernu en plena sano, li finu la gimnazon en plena sano, li sane iru el tie ĉiam pluen kaj pluen, en la universitaton...” — „He”, mi diras, „tio ĉi tute ne estas tiel necesa; oni povos”, mi diras, „esti kontenta ankaŭ sen tio; li nur finu la ok klasojn de la gimnazio”, mi diras, „tiam mi lin edzigos kun helpo de Dio...” Tiam mia kunulino diras kun rideto kaj rigardante min per siaj okuloj: „Diru al li, sinjoroj, ke li — mi petas lian pardonon — forte eraras; li vivas ankoraŭ laŭ la malnovaj manieroj.” — „Diru al ŝi, sinjoroj, ke mi dezirus havi tiom da benoj, kiom la malnovaj manieroj estas pli bonaj ol la novaj.” — „Diru al li, sinjoroj”, ŝi respondas, „ke li estas, li min pardonu...” Tiam la gastoj laŭte ekridis: „Aj, sinjoro Arono”, ili diras, „vi havas edzinon — bravulinon, Dio ŝin konservu; kozako, ne edzino!” Dume la gastoj trinkis po glaseto da vino, oni bone glutis, oni fariĝis viglaj; kaj oni kaptis nin ambaŭ en la rondon kaj la knabon ankaŭ en la mezon, kaj oni saltis, tute gaje, ĝis plena tagiĝo. Matene ni foriris kun li „tien”. Kiam ni venis tien, estis ankoraŭ tre frue, pordoj kaj pordegoj estis ankoraŭ ŝlositaj, ne troviĝis an-

koraŭ, kiel oni diras, eĉ freneza hundeto sur la strato. Longe ni staris ekstere kaj sufiĉe nin turmentis la frosto, tial ni ekĝuis grandan plezuron, kiam oni malfermis al ni la pordon kaj, dank’ al Dio, enlasis nin internen. Baldaŭ komencis kolektiĝi la anaro de la malgranduloj, kun la tornistretoj sur la dorsoj; fariĝis bruo, tumulto, babilado, ridado, kurado, hu, ha, tuta foiro! la blankbutonaj buboj saltadis, regaladis sin reciproke per frapoj, puŝoj, pinĉoj... Rigardante tiujn bube-tojn kun la ruĝaj vangetoj, kun la ĝojaj ridantaj okuletoj, mi rememoris — pardonu la komparon — nian estintan malluman, malvastan, malgajan ĥederon de la pasinta tempo, kaj mi konvinkiĝis, ke efektive „ŝi” estas prava; ŝi estas nur virino, tamen ŝi havas sur si viran kapon!... Kaj dum mi tiamaniere meditas, alvenas al ni iu kun orkoloraj butonoj, videble instruisto, kun folio da papero en la mano, kaj li demandas min, kion mi bezonas. Mi montras al li mian knabon, kaj diras, ke mi alkondukis lin en la ĥederon, t. e. en la gimnazon. Tiam li demandas min: „en la kioman klason?” — „En la trian”, mi diras; „li ĵus estas akceptita.” Li demandas min, kia estas lia nomo. „Katz”, mi diras, „Moseo Katz, t. e. Moŝko Katz”. — „Moŝko Katz?” li diras, — Moŝkon Katz li ne havas en la tria klaso! ekzistas, li diras, en lia listo iu Katz, tamen ne Moŝko, sed Morduĥ, *Morduĥ Katz*... „Kia Morduĥ!” mi diras; „ne Morduĥ, sed Moŝko!” — „Morduĥ”, li diras, kaj li alŝovas al mi la paperon rekte al la vizaĝo. Mi ripetas al li „Moŝko”, li ripetis al mi „Morduĥ!” Unuvorte, Moŝko, Morduĥ, Morduĥ, Moŝko, ni tiel longe nin reciproke moŝkadis kaj morduĥadis, ĝis ni sciiĝis tre belan historion: kion oni devis fari al mia knabo, oni faris al tiu! Vi komprenas la aventuron? Oni efektive akceptis unu Katz’on, jes, sed erare oni akceptis alian, ne nian! vi devas scii, ke en nia urbo ekzistas du Katzoj!... Kion vi diros pri tia historio? Mi pretigis la liton, kaj tiu havos la plezuron! Vi devas scii, kiu estas „tiu”, t. e. tiu Katz: senvalora nulo, metiisto, ŝajnas al mi, ke li estas bindisto aŭ io simila; per si mem li eĉ estas tute kvietita hometo, sed kiu lin konas, kiu scias pri li? absoluta senhavulo! Kaj nun lia filo estas akceptita! Ĉu ne povas krevi la galo? Diru vi mem!

Vi devis vidi la korŝirantan vizaĝon de mia knabo, kiam oni ordonis al li, ke li bonvolu depreni la ornamajeton de sia ĉapo! „Vi jam ne estas plu asesoro!...” Fianĉino dum la edziniĝa ceremonio certe ne devas elverŝi tiom da larmoj, kiom mia knabo elverŝis en tiu tago! Kiom ajn mi petis lin, ne helpis petoj, nek minacoj. „Nu”, mi diris al „ŝi”, „vi vidas, kiam amuzon vi aranĝis? Ĉu mi ne diris al vi, ke via gimnazio estos por li buĉejo? Dio helpu”, mi diras, „ke ĝi almenaŭ finiĝu por ni

glate, ke li — Dio gardu — ne malsaniĝu... — „Miaj malamikoj”, ŝi diras, „malsaniĝu, se ili volas, sed mia infano *nepre* devas eniri en la gimnazion! se li ne eniris *nun*, li eniros, se Dio permesos, *post unu jaro*; se li ne eniris *ĉi tie*, li eniros en *alia* urbo! Eniri li *nepre* devas, esceptinte nur se mi — Dio gardu — fermos miajn okulojn kaj la tero min kovros!” Vi aŭdas la parolojn? Kaj kiel vi pensas, kiu venkis? mi aŭ ŝi? Ni ne faru al ni iluziojn: se „ŝi” volas, ĉu oni povas tiam ion kontraŭfari?

Unuvorte, por ne paroli tro longe, — multe mi devis klopodi kaj suferi kun li. Mi estis kun li ĉie, kie nur ekzistas urbo, kie nur ekzistas gimnazio, ni estis, ni prezentigis, ekzameniĝis, kaj efektive sukcese ekzameniĝis, kaj efektive ricevis la plej altajn notojn, kaj tamen efektive ne estis akceptitaj! Kial? ĉiam pro la „procentoj”! Vi povas kredi al mi, mi tiam mem rigardis min kiel frenezulon: „malsaĝulo”, mi diradis al mi, „kio? por kio vi kuradas el unu urbo al alia? por kia diablo vi tion bezonas? nu, kaj se li eĉ jam estos akceptita, kio estos tiam?” Ne, diru, kion vi volas, obstineco estas granda afero; ĝi jam eĉ mi mem fariĝis afero de necedema ambicio. Fine Dio min kompatis, kaj mi trovis en Polujo tian specon de gimnazio, „komercan” gimnazion, en kiu apud ĉiu kristano oni akceptas unu hebreon, t. e. oni akceptas kvindek procentojn. Sed kio estas la esenco? Ĉiu hebreo, kiu deziras, ke lia infano estu akceptita, devas veni kun sia kristano, kaj se li, t. e. la kristano, sukcese faras la ekzamenon kaj vi enportas por li la lernejan pagon, tiam vi havas iom da espero... Sekve anstataŭ unu ŝarĝo oni tiam havas sur si du ŝarĝojn, vi komprenas? Ne sufiĉas, ke mia cerbo turmentigas pri mia propra infano, ĝi devas turmentigi ankoraŭ pri tiu alia; ĉar se — Dio gardu — Esav 16) ne sukcesas, tiam Jakobo pereas... Nu, mi devas diri al vi, antaŭ ol mi trovis tian kristanon, ian botiston — lia nomo estis Holjava, — mi devis multajn fojojn malbeni mian vivon; fine, kiam venis la ĝusta akto, nu, mia botistido eĉ la ekzameno falis en la teron kiel Korah! 17) Kaj la objekto, en kiu li montris plenan nesciadon, estis ĝuste... la „Religio!” Nu, kion mi rakontu al vi? mia knabo devis mem proprapersono sidigi kun li kaj ripetadi kun li la „Religion”... Vi demandos ja sendube, kiamaniere mia knabo scias la kristanan religion? Tion ne demandu, ĉar li scias ĉion kaj estas kompetenta en ĉio kaj komprenas ĉion; se oni diras al vi, ke li havas bonan kapon, vi nenion devas demandi. Unuvorte, Dio helpis, venis la bona horo, la feliĉa horo, ili ambaŭ estis akceptitaj. Vi pensas, ke jam ĉio estas finita? Kiam venis la tempo enskribi en la librojn kaj preni kvitancon, — mia kristano ne aperis!

Kia estas la kaŭzo? Li ne volas, ke lia filo troviĝu inter tiom multe de hebreoj! Faru kun li, kion vi deziras, — li ne volas! Li diras, ke li tion ne bezonas, ĉar por li, kiel por kristano, ĉiuj pordoj ja sen tio estas malfermitaj kaj li povas eniri, kien li volas! Kaj efektive, ĉu li ne estas prava! „Kion do vi deziras, sinjoro Holjava”, mi diras al li. — „Nenion”, li respondas. Unuvorte, diskuto post diskuto, helpo de komplezemaj homoj... oni iris kun li en restoracion oni trinkis unu glason, duan, trian... Antaŭ ol mi atingis, ke li fine prenis la gimnazian kvitancon, mi perdis ĉiujn miajn fortojn. Fine, kun helpo de Dio, la celo estis atingita, kaj mi dankis la Plejpotencan, ke Li donis al mi ripozon.

Mi venis hejmen, — nova aventuro! Kio estas denove? Mia kunulino primeditis kaj decidis jenon: „Kiel! ni havas ja nur unu solan filon, unu okulon en la kapo, kaj nun li estos tie kaj ni estos ĉie tie? „Se estos tiele”, ŝi diras, „por kio mi bezonas mian tutan vivon?” — „Kion do vi deziras, ekzemple”, mi diras. — „Kion mi povas deziri? Vi ne scias, kion mi deziras? Mi deziras”, ŝi diras, „esti kune kun li.” — „Nu, kaj la domo?” mi diras, „kio estos kun la domo?” — „La domo”, ŝi diras, „estos domo”... Nu, kion vi povas diri al ŝi? Por ne rakonti longe, mi simple diros al vi, ke ŝi enkaleŝiĝis kaj forveturis kun li tien, kaj mi restis tute sola en la tuta domo. Prezentu al vi, kian aspekton la domo ricevis! Al miaj malamikoj mi deziras tian domon. La vivo ĉesis esti vivo, la negoco ĉesis esti negoco, ĉio ruiniĝis, kaj nia tuta okupiĝo fariĝis skribado de leteroj; mi skribas al ŝi, ŝi reskribas al mi! leteroj tien, leteroj reen: „pacon kaj sanon al mia kara edzino”... „pacon kaj sanon al mia kara edzo”... „Pro Dio”, mi skribas al ŝi, „al kio tio kondukos? oni estas ja nur homo! seĉi mastrino kia povas esti la ordo!...” Unuvorte, ĉio helpis kiel la pasintjara neĝo; venkis, kompreneble ŝi, ne mi: ĉar ni ne faru al ni iluziojn: se „ŝi” ion volas, ĉu tiam oni povas ion kontraŭfari?

Nu, mi finos la rakonton. Mi min rompimis, mi min detruis, mi ruinigis mian tutan negocon, disvendis ĉion por plej bagatelaj prezoj, kaj mi transpakis min al ili. Kiam mi venis al ili, mi komencis rigardi ĉirkaŭen, por orientiĝi, mi komencis serĉi kaj flari. Kun granda malfacileco kaj post longaj klopodoj mi sukcesis trovi ian vojeton, mi faris kompanion kun ia komercisto. Laŭ la aspekto li estis eĉ tute bonorda homo, jes... solida mastro kaj apartenas eĉ al la administrantaro de la sinagogo... sed esence li estis ruzulo, trompisto, ŝtelisto, li preskaŭ tute malfeliĉigis min! Vi sekve komprenas, en kia stato tiam estis mia kapo...

Kaj jen unu fojon mi venas hejmen, kaj mi vidas, mia knabo venas al mi

renkonte iel strange, kun ruĝeta vizaĝo kaj en ornamajeto sur la ĉapo 18). „Aŭskultu, Moĉjo”, mi diras al li, „kion perdiĝis via ornamajeto?” Kaj li diras: „kia ornamajeto?” Mi diras „la butono”. Li diras: „kia butono?” Mi diras: la „butono, kiu estis sur la ĉapo; ankoraŭ antaŭ la festoj mi aĉetis ja al vi novan ĉapon kun nova ornamajeto!”... Tiam li ruĝiĝis ankoraŭ pli kaj diris al mi: „mi deprenis”... Mi diras: „kion signifas, ke vi deprenis?” Li diras: „mi estas libera”... Mi diras: „kion signifas, vi estas libera?” Li diras: „ni ĉiuj estas liberaj”... Mi diras: „kion signifas, vi ĉiuj estas liberaj?” Li diras: „ni ne iras plu en la gimnazion”... Mi diras: „kion signifas, vi ne iras plu en la gimnazion?” Li diras: „ni faris komunan interkonsenton, ke ni plu ne iru”... Mi diras: „kion signifas, vi faris interkonsenton? kiaj faristoj? kiaj interkonsentistoj? Nu, bela ĝojo al mi venis”, mi diras; „por tio mi min ruinigis, por tio mi min elmetis al ĉiaspecaj suferoj kaj humiligoj, por ke vi poste povu fari komunan interkonsenton? Ho ve, ho ve”, mi diras, „al vi, al mi kaj al ni ĉiuj! Dio volu almenaŭ, ke tio ne alportu ian grandan malfeliĉon al la hebrea popolo, ĉar ĉie la hebreo estas ja la propeka kapro!”... Tiel mi parolas al li, kaj mi komencas flamiĝi, moralinstrui, kiel ordinare patro parolas kun infano... Sed mi havas ja edzinon, longe ŝi vivu; ŝi alkuras kaj komencas tamburi per sia lango, ke estas tiel kaj tiel, ke mi jam tute sensukigis, ke mi ne havas eĉ plej malgrandan scion pri tio, kio fariĝas en la mondo, ke nun fariĝis tute alia mondo, saĝa mondo, sincera mondo, libera mondo, mondo, en kiu ĉiuj estas egalaj, en kiu ne ekzistas riĉa kaj malriĉa, ne ekzistas sinjoro kaj sklavo, ne ekzistas ŝafo tondata, ne ekzistas hundo bojanta, ne ekzistas kato gratanta, ne ekzistas muso morde-tanta...” — „Ta, ta, ta,” mi diras, „kie vi prenis tian strangan lingvon? ĝi estas ia nova lingvo”, mi diras, „novaj vortoj; eble estus bone, ke vi samtempe jam ellasu la kokinojn el la kaĝo: iru, kokinoj, fariĝu mastrinoj?... Tiam ŝi ekflamas, kvazaŭ mi elverŝus sur ŝin dek sitelojn da bolanta akvo, kaj komenciĝas tra ra, ra, laŭ „ilia” maniero... Nu, oni devas jam aŭskulti la predikon ĝis la fino, sed la malfeliĉo konsistas en tio, ke tiu prediko ne havis finon. „Nu”, mi diras al ŝi, „bone, sed nur faru finon; mi batas al mi la bruston, mi konfesas, ke mi pekis, mi krimis, nur faru finon, nur lasu al mi pacon!” Sed ŝi ne volas aŭdi nek vidi... „Ne”, ŝi diras, ŝi volas scii, kial, kaj por kio, kaj kiarajte, kaj precize, kaj kontraŭe, kaj kiel la konscienco permesas, kaj kiel konvenas, kaj denove, kaj denove, kaj ankoraŭ unu fojon denove la samon!...”

Diru, mi petas, kiu elpensis... edzinon?

(Vidu la notojn: p. 8 kol. 1)

## NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ

PREMION akiris post n-roj 177/178: S-ro A. Pittoors, el Deurne. por V.E.B. kaj por L.E.E.N.: f-ino P. B. Sla el Velp.

### SOLVOJ.

179. kapkuseno, silkraŭpo, trinkmono, libervole, kroĉtriki, ventolilo, speguligi, precizigi, postsigno, interveni, reakciulo, obstinulo, piedfrapi, vangfrapo, pavimisto, privatulo, kritikema, registaro, klientaro, profetaĵo, velveturi, sukoplana, neokupita, almozpeti, vaporsipo, flamiĝema, elturniĝo, friponaĵo, orgenisto, gvidlibro. Pli bone estas enviigi ol kompatigi.

180. *Hor.*: kremo, nav, io, rok, bru, eman, ekzot, bo, ami, usonan, ĵaluza, ileks, lado, plaĝo, pi, kal, flor, era, trofe, ek, nerekt, ondad, urin, ono, fuŝita.

*Vert.*: kreaĵ, patrol, rok, agl, ekzil, akordo, urg, an, obtuz, ofendo, sal, nubo, apokrif, onidir, ve, alo, akus, mane, ke, tri, iam, klare, it, oniks, lakona.

### 181. CIFERENIGMO.

Helpe de la subaj vortoj rekonstruu 114-literan strofon de versaĵo, aperinta antaŭ kelka tempo en ĉi tiu gazeto.

Klarigo de la serĉotaj vortoj:

- 1) 71.9.25.75.102.4.31.87.99.16.34.26.: ĝi moviĝas laŭ la vento.
- 2) 19.28.61.66.85.2.107.87.96.80.26.: iu servistino.
- 3) 1.42.53.70.91.22.73.17.27.26.: muzikilo.
- 4) 62.79.105.3.43.54.23.51.89.26.: muzikilo.
- 5) 20.32.83.110.90.30.57.82.26.: ĝi kreskas sur altaj montoj.
- 6) 41.56.18.68.81.90.93.29.103.: hejmigita.
- 7) 52.77.112.46.78.40.75.26.: konfite en vinagro, ĝi servas kiel spicaĵo.
- 8) 100.50.88.5.47.59.49.26.: ĝi produktas fajrerojn, eksplodigitajn la gasmiksaĵon en motoro.
- 9) 97.108.38.60.8.65.94.26.: inflamo de la fingro
- 10) 70.11.58.1.111.39.106.: definitive forigi.
- 11) 6.48.25.21.55.110.26.: hejma besto.
- 12) 7.109.101.36.69.75.26.: aro da organoj rilatantaj al sama fiziologia funkcio.
- 13) 49.86.71.15.113.13.26.: floro.

(Komenco: p. 7, kol. 3)

14) „Bar-micvo”: atingo de la 13-jara aĝo, kiam hebreo fariĝas religie memstara.

15) Metala signo, kiun la gimnazianoj portas sur la ĉapo.

16) Frato de la Biblia Jakobo.

17) Homo, pri kiu la Biblio rakontas, ke lin englutis la tero.

18) La aŭtoro rakontas ĉi tie pri la striko, kiun dum la rusa-japana milito faris la gimnazianoj en preskaŭ ĉiuj gimnazioj de Polujo. Tiu ĉi striko malfeliĝis tre grandan nombron da infanoj.

- 14) 10.74.31.104.33.64.26.: mastro.
- 15) 95.108.64.72.22.76.: trempi en vinagro kun spicoj.
- 16) 63.35.84.98.12.26.: frukto el varmaj landoj.
- 17) 80.14.44.67.45.26.: nimfo de riveroj.
- 18) 92.37.66.24.114.26.: malgranda mamulo ofte uzata por vivisekco.

### 182. KRUCVORTENIGMO.

*Horizontale.* 1. montranta egan ŝaton; identa (R). 2. afrika gramenaco (R); geografia karto (R); femalo. 3. ĝi estas farita el suko de floroj; akragusta spicaĵo (R). 4. vidalvide al. 5. kombinita kun kloro ĝi estigas la salon uzatan en manĝoj (R); spekulativa rezonado kontraste kun praktika aplikado (R); memkompreneble (R). 7. trafikilo (R); malmoliginta haŭto (R); organika nutra fluaĵo (R). 8. atingi (R); fekunda loko loke en sterila regiono. 9. povanta esti dispecigata per bato (R). 10. sovaĝa besto; laŭdegi.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
1	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
2	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
3	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
4	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
5	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
6	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
7	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
8	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
9	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
10	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■
11	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■	■

*Vertikale.* mallarĝa metala plato (R); el tre malmola fleksebla metalo. 2. pronomo; havigi al si (R). 3. ŝajnigi per nesimplaj manieroj (R); eklezia distrikto (R). 4. ĝi ebligas vidi malproksimajn objektojn (R); ebena parto el kiu io elreliĝas (R). 5. gaso en akva solvaĵo, uzata por purigi vestojn (R); frazo metita antaŭ artikolo por montri ĝian ĉefan ideon (R). 6. subtera vivanta mambesteto (R). 7. homo posedanta lertecon akiritan per agado (R); tre granda. 8. spirebla gaso (R); sufikso (R). 9. bleko de iu hejma besto; eleganta ĉambro (R). 10. sufikso (R); denove preni kiel rimedon por atingi celon (R). 11. kunligi per senpintaj ŝraŭboj; plej zorge imiti.

Solvojn sendu la nederlandanoj al s-ro G. J. Teunissen, Burg. Tellegenstraat, 21 hs., Amsterdam-Z.; la membroj de F.L.E. aŭ de R.B.L.E. al s-ro F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge, antaŭ la 31/XII/1954.

## Deklaro de Japana Scienca Konsilantaro

La atombomboj falintaj sur Hiroŝima kaj Nagasaki ĉe la fino de la lasta milito forprenis la vivojn de triono de miliono da niaj samlandanoj, kaj postlasis al la japana popolo neforgeseblan impreson de la teruraj efektoj de ĉi tiu armilo. Lastatempe la incidento de radioaktiva polvo pro la eksperimentoj de hidrogenbomboj ĉe la Bikini Atolo kaŭzis neatenditajn seriozajn akcidentojn, inter kies suferantoj estis grupo da japanaj fiŝistoj. Ĉi tiu incidento pligravigis nian gravan intereson al la konsekvencoj de la evoluo de nukleaj armiloj.

Ni tamen rimarkas aliflanke la fakton, ke la apliko de nuklea energio al pacaj celoj devas kontribui grandegale al la estonta bonfarto de la homaro; super ĉio, la japana popolo havas neceson serĉi novajn teknikojn kaj fontojn de energio por plialtigi sian vivnivelon; kaj niaj sciencistoj forte sentas sian respondecon koncerne al la studo kaj evoluigo de atoma povo.

Malfeliĉe, la nuntempa internacia situacio estas tre malproksima de favoro al la nutrado de scienca esploro evoluigi ĉi tiun novan formon de energia fonto kun memfida certeco pri pozitiva kontribuo al la paco kaj bonfarto de la homaro: la konkuro, kiun ni vidas ĉirkaŭ ni, por la produkto de ĉiam pli grandaj kaj pli timindaj atomarmiloj ne povas ne lasi nin en malespero pri iama realiĝo de niaj esperoj.

Ĉi tiu dilemo devas esti de la tuta mondo: ni kredas, ke ni esprimas la komunan senton de la popoloj de la tuta mondo sincere apelante por la interrompo de la eksperimentoj de la atomaj kaj hidrogenaj bomboj, la forigo de amasdetruaj nukleaj armiloj; kaj la establo de efektiva internacia kontrolo de atomenergio.

Ni bone scias, ke ĉio supre dirita ne povas esti realigita facile sub la nunaj cirkonstancoj; sed ni estas konvinkitaj, ke estas nia devo labori en la direkto al tiu celo, fronte al ĉiu malfacilo kiu staras kontraŭ ni. Ni japanaj sciencistoj decidis ŝpari nenun penon en klopodo estigi internacian atomsferon, kiu povas nutri progreson al la supre dirita celo. Ni alvokas al ĉiuj sciencistoj kaj sciencaj organizoj de la mondo partopreni en niaj klopodoj al ĉi tiu celo per siaj aktivecoj en siaj respektivaj kampoj.

El „La Revuo orienta” Julio 1954.

*Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantisten-bond Postbus 100, Mechelen en Ned. Esperantisten-Vereniging LEEN, Stadionkade 6 Amsterdam Z. - Drukkerij Krol, Hoofdstraat 31, Uithuizen (Ned.)*